

Svisa Esperanto-Societo

informas

jaro 2010 numero 2-a: aprilo-junio
dissendo je la 31-a de marto



ARAI Toshinobu kaj Mireille GROSJEAN gastas ĉe HARADA Hideki en Okayama

HARADA Hideki (dekstre), kirurgo nun parte emerita, estas la ĉefdelegito de UEA por Japanio. Li loĝas en Okayama kaj aktivas ene de Universala Medicina Esperanto Asocio. Lia edzino nomiĝas Husako. Ambaŭ havas 4 filinojn kaj nun plurajn genepojn. En 1987 la familio HARADA venis al Eŭropo. Hideki partoprenis la Universalan Kongreson en Varsovio kun la du plej aĝaj filinoj, kiuj ĉeestis la Infanan Kongreseton. Kaj Husako restadis ĉe KCE en La Chaux-de-Fonds kun la du plej junaj filinoj. Tiam Mireille Grosjean studis esperanton ĉe KCE. Tuj ambaŭ virinoj amikiĝis, kaj sekve la filinoj HARADA vice restadis ĉe Mireille en Les Brenets post siaj gimnaziaj studoj por informiĝi pri la eŭropaj kutimoj. Siaflanke Mireille plurfoje restadis ĉe la familio HARADA en Okayama en 2007 kaj en 2008-2009 kaj en Tokyo ĉe unu el la filinoj, sinjorino Suga, en la kvartalo Korakuen.

Rememorigilo

SES informas

Redakcio :

Claude Gacond, Str. Chevreuils
14, CH-2300 La Chaux-de-Fonds

Retpoŝto : gacond@bluewin.ch

Tel. : hejme: 032 926 52 32
ĉe CDELI : 032 967 68 42

Redaktaj kunlaborantoj:

Nancy Fontannaz, Stefano Keller,
Richard Schneller

SES informas

Redaktaj datlimoj

2010 3 : julio-oktobro :

julie 1, dissendo 15-an de aŭgusto.

2010-4 : novembro-decembro :

oktobre 10, dissendo 1-an de novembro.

2011-1 : januaro-marto :

januare 10, dissendo 1-an de februaro.

2011-2 : aprilo-junio :

marto 10, dissendo 1-an de aprilo.

Konsultu la retejon de SES !

www.svisa-esperanto-societo.ch

SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto, Grand-Rue
9, 2416 Les Brenets. Tel.: 032 932 18 88 kaj
079 69 709 66.

Retpoŝto : mirejo.mireille@gmail.com

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, Archstr.
2, 8610 Uster. Tel.: 044 251 50 25. Retpoŝto :
info@esperanto.ch

Stefano Keller, sekretario, CP 6034, 1002
Lausanne. Tel.: 076 261 06 09. Retpoŝto:
kellerstefano@gmail.com

Hans-Werner Grossmann, kasisto, Esperanto-
Servo, PF 262, 4132 MuttENZ 1. Tel.: 076 460
89 92. Retpoŝto: esperanto-servo@bluewin.ch

Nelida Weidmann González, respondeca por
familiaj renkontiĝoj kaj aktivecoj. Archstr. 2,
8610 Uster. Tel. : 044 251 50 25.

Poŝta ĉekokonto :

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo
2300 La Chaux-de-Fonds

Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	

Vivo de SES

2010-2, redaktis: Stefano Keller

Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto-Societo sabate, la 17an de aprilo 2010 (rememorigo)



Wil, Restoracio Freihof, Bronschhoferstr. 2

www.hotelfreihof.ch

5 minutojn piede de la stacidomo laŭ Obere Bahnhofstrasse

- 10h00 Malfermo, akcepto
- 11h00 Ĝenerala Kunveno
- 12h30 proks. fino de la Ĝenerala Kunveno
- 13h00 Manĝo (surloke)
- 14h30 Prelego de Mirejo Grosjean pri « UN, UNESCO, UEA »
- 15h30 proks. fino de la prelego
- 17h00 proks. fino de la tago

Aliĝo

Pro organizaj kialoj necesas anonci sian partoprenon ĝis komence de aprilo

- per aliĝilo (en SESi 2010-1) sendenda al: *M Grosjean, pf 9, 2416 Les Brenets*

- aŭ retmesaĝe:

mirejo.mireille@gmail.com

- aŭ per la aliĝilo reta:

www.svisa-esperanto-societo.ch/jarkunveno

Tagordo de la Ĝenerala Kunveno de SES

1. Salutado, konstato de la nombro de ĉeestantoj, informoj pri senkulpiĝoj
2. Aprobo de la tagordo
3. Elekto de voĉnombrantoj
4. Evoluo de la membraro
5. Aprobo de la protokolo de la Ĝenerala Kunveno 2009 (*SESi 2009-3*)
6. Vivo de la societo: aprobo de la estrarraporto (*SESi 2010-1, p.2-4*)
7. Financoj. Prezento kaj aprobo (*legu ĝin ĉi-sekve*)
8. Konsisto de la Estraro. Elekto de estrarano
9. Elekto de kaskontrolantoj
10. Projektoj por 2010
11. JES (junuloj), SIS (Svisa ILEI-Sekcio), SFERO (familia renkontiĝo), SAT, SAT-Amikaro, Pasporta Servo k.s.
12. Buĝeto 2010 (*legu ĝin ĉi-sekve*)
13. Diversaĵoj

SES - Jarkalkulo 2009 kaj bilanco 31.12.2009, buĝeto

BILANCO		31.12.2009		
1000	Kaso			
1010	Poŝtkonto		3'042.77	
1011	Poŝtkonto deposito (antaŭe kasobligacio)		7'018.95	
1030	WIR Banko		25'164.50	
1060	Prunto al KCE		15'000.00	
1090	UEA konto sesa-v		328.68	
1100	Inventaro		1.00	
1150	Bonhavo antaŭimposto		107.50	
1300	Transaj aktivoj			
	AKTIVA SUMO		50'663.40	
2000	Transaj pasivoj		2'518.10	
2100	Kapitalo 1.1.09: 53'139.80			
	- plielspezoj 2009: 4'994.50 = kapitalo 31.12.09		48'145.30	
	PASIVA SUMO		50'663.40	
		JARKALKULO	BUĜETO	
			2009	2010
3000	Informado, varbado	3'046.25	3'000	5'000
3005	Konkurso 2009	8'111.35	Vidu sub projektoj	0
3010	Omaĝoj, laborrimedoj		200	200
3020	Subvencioj, premioj, projektoj	600.00	8'000	600
3110	„SES informas“	2'437.80	3'000	3'000
3120	Kunvenoj kaj kunsidoj (ĜK, estraraj, regionaj)	541.00	700	700
3200	Kotizoj al UEA, EEU, ktp.	236.10	250	250
3210	Administrado (afrankoj, telefonkostoj, ktp)	367.65	300	400
3220	Bank- kaj poŝtspezoj	73.45	100	100
3230	Donaco al KCE	450.00	450	450
3500	Diversaĵo		300	300
	ELSPEZA SUMO	15'863.60	16'300	11'000
4200	Membrokotizoj	4'900.00	5'000	5'000
4210	Abono al “SES informas” sen membreco	650.00	500	500
4300	Donacoj, heredaĵoj	4'570.00	5'500	1'500
4600	Bank kaj poŝtinterezoj	749.10	700	650
	ENSPEZA SUMO	10'869.10	11'700	7'650
	PLIELSPEZOJ	4'994.50	4'600	3'350

10.02.2010 /H.W.Grossmann

Raporto de la kaskontrolantoj

Bonvolu legi ĉi-suban kopion de la raporto pri kaskontrolo

Raporto de la kaskontrolantoj por 2009

Ni, subskribintoj, Dieter Rooke kaj Barbara Pochanke kunsidis kun la kasisto Hans-W. Grossmann en Olten por kontroli la librotenadon 2009 kaj ni konstatis ke

- la ciferoj de la prezentata bilanco je la 31.12.2009 kaj de la jarkalkulo 2009 kongruas kun la saldoj de la kontoj
- la pruviloj de difinitaj elspezoj kiujn ni detale kontrolis kongruas kun la registritaj sumoj en la kontoj
- la librotenado estas orde farita


Samtempe, ni ekzamenis la apartan konton "Enciklopedio", kiun la kasisto prizorgas por CDELI kaj SES. Dum 2009 estis venditaj 33 ekzempleroj kaj danke al la grandaj siatempaj donacoj tiu konto montras bonhavajon de 10'035.87 frankoj.

Ni dankas multe al Hans-W. Grossmann pro la akurate farita librotenado.

Ni rekomendas aprobi la jarkalkulon 2009 kun plielspezoj de 4'994.50 frankoj kaj la bilancon je la 31.12.2009 kun kapitalo de 48'145.30 frankoj kiel ankaŭ la konton "Enciklopedio" kaj malŝargi la kasiston kaj la estraron.

13-a de februaro 2010

La kaskontrolantoj:


.....
Dieter Rooke


.....
Barbara Pochanke





*Svisa Feria Esperanta Renkontiĝo SFERO * 14a-17a de oktobro 2010*

Karaj revenantaj kaj unuafojaj SFERO-anoj!

Nia celo estas doni la eblon al esperantistoj kaj al ne-esperantistoj kunvivi la esperantan etoson kaj montri, ke Esperanto ankaŭ en Svislando estas vivanta lingvo.

Tiu renkontiĝo ne estas nur por familioj, sed ĝi estas malfermita ankaŭ al ĉiu, kiu interesiĝas pri Esperanto kaj ties kulturo.


Tiufoje SFERO okazos en la feridomo "Les Sapins de l'Amitié", en Métabief, Francio, tute apud Vallorbe (VD), Svislando.

Pliajn informojn pri loĝado kaj prezoj vi trovos sub: www.esperanto.ch/sfero

Aliĝu tuj per

- retmesaĝo al: nelida@esperanto.ch
- telefone: 044 251 50 25 (lu-ve, 10h00-12h00 kaj 14h30-15h00)

Bonvolu aliĝi kiel eble plej frue, prefere antaŭ la 1a de junio 2010.



Tutsvisa aktiveco

CDELI

**Centro de Dokumentado kaj
Esploro pri la Lingvo Internacia**

Bibliothèque de la Ville, Progrès 33
CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds
Tel. : 032 967 68 42.

claude.gacond@ne.ch
martine.schneller@ne.ch
nancy.fontannaz@ne.ch

Venontaj stud-aranĝoj !

Didaktika stud-sabato okazas principe la trian sabaton de la monato en neferia periodo helpe al ĉiuj esperanto-lernantoj : tutkomencantoj, komencantoj kaj progresantoj. Instruas Monika Molnar, Nancy Fontannaz kaj Luc Allemand. Rezervu la sekvajn sabatojn : **aprile 24, majo 29, junio 19, septembro 25, oktobre 23, novembre 20, decembre 18.**

Informilo en la franca kaj germana pri la studsabatoj akompanas nian bultenon pro la espero, ke la lokaj grupoj ilin reproduktos kaj diskonigos. Tiu regula studeblo de esperanto helpu al iliaj propraj kursanoj. Kial eĉ ne organizi grupan partoprenon al tiuj studsabatoj?

La Kultura Seminario reokazos principe la unuan sabaton de la monato ekde septembro. Studemuloj do rezervu la sekvajn sabatojn: **septembre 4, oktobre 2, novembre 6 kaj decembre 4.**

Unu el la studtemoj estos la vortfarado en Esperanto. Antaŭ ekzakte cent jaroj, tio estas en 1910, René de Saussure, rebate al la kritikoj de Louis Couturat, proponis vortfaradan principaron, kiu ankoraŭ nun, almenaŭ didaktike, estas ĝenerale akceptata. Lia verko firmigis la pozicion de Esperanto kontraŭ la Ido-skismo. En la tridekaj jaroj Kálmán Kalocsay kaj Gaston Waringhien, en sia epokfara *Plena Gramatiko de Esperanto*, iom tro detale precizigis tiujn vortfaradajn regulojn. Siavice en 1976 ilian gravan verkon kritikis la lingvisto István Szerdahelyi en la deka kajero de la kolekto *Studioj* de KCE. Ni ekzamenos la gramatikajn hezitojn de la unuaj esperantistoj (kaj de la Esperanto-lernantoj), malkovros la sinsekvajn kontribuojn de Saussure, Kalocsay kaj Waringhien kaj la kritikojn de Szerdahelyi, jen unu el la objektoj de la venonta kurssesio. Sed aliaj temoj ankaŭ okupos nin: raportoj pri legaĵoj, malkovro de verkistoj, respondo al primovadaj kaj prilingvaj demandoj, ktp.

Claude Gacond.

ILEI

Svisa sekcio. Mireille Grosjean,
Grand-Rue 9, 2416 Les Brenets
mirejo-mireille@gmail.com

En Svislando oni ĝojas konstati, ke Internacia Ligo de Esperantistaj

Instruistoj (ILEI) ekkonas novan dinamismon, kiu instigas ankaŭ plivigliĝi en Svislando mem kadre de nia svisa ILEI-sekcio. Tial ni publikigas la ĉefajn partojn de agadraporto de la nova ILEI-prezidanto Stefan MacGill.

Cent tagoj da laboro

ILEI elektis novan estraron. Pasis cent tagoj depost la enoficigo, do indas resumi la atingojn de tiu periodo :

- * Revigligo de la hejmpaĝo: pluraj novaj eroj aldonataj ĉiusemajne.
- * Komunika intensigo : regulaj mesaĝoj al sekcioj, komitatanoj, listoj.
- * Multifaceta partopreno en la Universala Kongreso en Bjalistoko.
- * Aperigo de la *Internacia Pedagogia Revuo* 2009/3 kun konferencaj raportoj.
- * Aktiva interveno por ebligi la instruist-trejnman kurson en Poznan.
- * Eldono de unua bulteno kaj aliĝilo por la 43-a konferenco en Kubo.
- * Pretigo de varbiloj por la lanĉata membrovarba kampanjo por 2010.
- * Partopreno ĉe trilanda lerneja renkontiĝo : Britio, Germanio, Hungario.
- * Aktiva kontribuado al Torpedo 5 en Germanio, kun trejnkurso por polaj kaj slovakaj instruistoj.
- * Salutado kun postsekvado al interalie korea kongreso, konga lernejinanĝuro kaj brita kurso.
- * Anonco de ekzamena sesio jarfine en Togolando, kaj kunlaboro kun KER-sesioj en Germanio kaj Pollando.
- * Aperigo kaj dissendo de la dua numero de *Juna amiko*.

* Sukcesa reprezentiĝo de ILEI ĉe Unesko pere de franca delegacio.

Agado en preparo :

- * Aranĝo en Afriko en 2010.
- * Konstruo de strategio akiri subvenciojn por projektoj en 2010.
- * Reaktivigo de sekcioj en Belgio, Britio kaj Irano.
- * Trakto de Hispana aliĝpeto, klopodoj en Portugalio kaj Pakistano pri fondo de sekcioj.
- * Preparoj por estrarkunsido en Roterdamo (Nov 26-30).
- * Pretigoj elpaŝi en la malferma tago de UEA en la Centra Oficejo.
- * Starigo de instruista trejnado por latinamerikanoj kadre de la kuba konferenco.
- * Kaj multo pli !

Ni efektive en la unuaj cent tagoj plenumis malpli ol la esperoj. Tamen, la atingoj reprezentas solidan ekpaŝon, kaj signalas klare novajn vojojn por la ligo, kiujn ni, precipe tra nia baldaŭa estrarkunsido, devos fortigi kaj progresigi.

En mia ĉefartikolo en la tria numero de *Internacia Pedagogia Revuo* mi proklamis, ke ni devas difini ne nur celojn, sed ankaŭ projektojn, plenumantojn kaj limdatojn, ĝuste kiel faras komercaj entreprenoj. Eble miaj vortoj impresis brutalaj. Tamen, mi ne pentas ilin - sed restas konvinkita, ke ni devas alpreni tiajn labor-manierojn. Ĉe kompanioj kaj registaraj ministerioj la homoj submetiĝas al tiaj liverskemoj, ĉar oni pagas (kaj foje pluspagas) ilin tion fari. Ĉe ni estas esenca diferenco. En libervolaj movadoj kiel la nia la kunlaborantoj

pretas alpreni tian disciplinon, nur se ili kredas aŭ estas konvinkeblaj, ke tio estas la plej efika vojo transformi siajn organizojn al sukcesaj celplenumaj unuiĝoj.

Tra la lastaj jaroj ILEI enkasigis kritikojn, ke ĝi ne agadis sufiĉe, similaj kritikoj atingas nin ankoraŭ nun. Sed tutan agadon ne povas plenumi sep estraranoj, nek trideko da komitatanoj. La sekcioj kaj la membroj kaj edukemuloj ĉie devas kontribui! Jen du sloganoj por pensigi vin :

Se ne vi, kiu alia?

La Centra Oficejo de ILEI? tio povas esti nenio alia ol vi, mi kaj ni ĉiuj.

Do, membroj - restu kun ni en 2010, venigu aliajn !

Ne-membroj, aliĝu al ILEI, por ke kune ni konstruu tian poredukan forton, kiun ni sopiras, kaj kiun la movado bezonas !

Stefan MacGill, Prezidanto de ILEI
stefan.macgill@gmail.com

KCE

Kultura Centro Esperantista
Esperanto-Domo, Strato Postiers 27,
Poŝtfako 311
2301 La Chaux-de-Fonds.
Tel. & fakso: 032 926 74 07.
esperantio.net

La Asembleo de KCE pri la svisa Esperantio

La ordinara Asembleo de KCE kunvenis la 30-an de januaro sub la tagprezido de David Buhlmann kaj kun la protokolado de Mariola Jobin.

La jarkunveno ekis per la honorigo al la forpasinta apogantino Berthe Spalinger. Giorgio Silfer mem prezentis oracion, memorante ankaŭ ŝian edzon Alfred, mortintan je distanco de nur kelkaj semajnoj.

La Asembleo diskutis pri la raportoj de la Komitato kaj de la revizoroj, aprobante ilin kun kontento kaj kun gratuloj. Tuj poste ĝi renovigis la Kulturan Konsilion: por la mandato 2010-2014 estis elektitaj Perla Martinelli (4a mandato), Carlo Minnaja (2a mandato), Bertil Nilsson (1a mandato), Giorgio Silfer (4a mandato) kaj Ljubomir Trifonĉovski (3a mandato).

La Asembleo modifis ankaŭ la lastan artikolon de la statuto de KCE, konforme al la rekomendo ricevita de la Fisko. Nun estas eksplicita la normo laŭ kiu, okaze de malfondo, la membraro ne rajtas dividi inter si la bonharon, sed devas destini ĝin al publikutila (do senimpostigita) institucio kun similaj celoj.


Fine, post diskuto, kiun partoprenis la oficiala reprezentanto de Svisa Esperanto-Societo, Marion Bélisle, (kiu distanciĝis de la letero sendita de SES-kunprezidanto), la Asembleo aprobis unuanime (kun du sindetenoj) la sekvan rezolucion:

La ordinara Asembleo de KCE, kunveninta en la Esperanto-Domo de Ĉaŭdefono la 30-an de januaro 2010, informite pri la incidento kun SES kaŭze de la letero subskribita de Dietrich Weidmann, kunprezidanto, nome de la SES-estraro, en dato 9 julio 2009; aprobinte la sintenon de la Komitato de KCE tiurilate;

respektante la historion de SES, fondita en 1903; komparinte la statuson financan kaj la statuson juran de SES kun aliaj reale funkciantaj organizoj, kiuj uzas esperanton en Svislando; deklaras, ke neniu

esperanto-societo estas konsiderebla kiel oficiala, unusola kaj legitima reprezentanto de esperanto por la tuta Svislando.

Laŭ HeKo 421 4-B, 31 jan 10



Loka vivo

Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 178, 4005 Basel

Tel. : 0049 76 214 57 12.

Kunvenoj : 20h00 en la kelo de la malantaŭa domo, Riehenring 129.

esperantobasel@gmx.ch

PC : 40-33714-4

Jarkotizo unuopa : Fr 25.-, paro : Fr 30.-

Venontaj kunvenoj

Aprile 22 : Filmo.

Maje 27 : Prelego de Hans-Peter Senn pri la skoltoj kaj kantado.

Junie 24 : Grün'80.

Julie 14 : Vizito de la nacia festo en Francio.

Aŭguste 26 : Hans-Peter Seen prezentas siajn bildojn.

Septembre je tago decidota : Migrado al « *La Petite Camargue* ».

Oktoobre 28 : Ni parolos pri niaj ferioj.

Novembre 25 : Programo 2011.

Decembre : Zamenhofa festo en Francio.

Bern

S-ro Ueli Haenni, Linckweg 2, Postfach, CH-3052 Zollikofen.

Telefone : 031 911 64 72 (kun respondilo) aŭ oficeje 031 911 23 22.

ueli.haenni@swissonline.ch

Fribourg

Tritaga kurso pri Esperanto en Friburgo

En *Collège Sainte-Croix* (Gimnazio Sankta Kruco) en Friburgo okazis tri tagoj eksterkadrj = *Journées hors cadre*. La kutima stud-ritmo haltas, venas novaj ne-kutimaj temoj, novaj personoj por instrui. Instruisto aŭdis pri Esperanto tra Charlotte Blanc Maillard en Vevey, ĉar ili havas komunajn pa-

rencojn. Li metis Esperanton sur la liston de la elekteblaj fakoj. 15 studentoj aliĝis al ĝi. Mireille Grosjean estis nomumita kiel instruisto kaj ŝi havis publikon el 17 personoj, ĉar du instruistoj ankaŭ sekvis la kurson. Jen kiel ŝi raportas pri la tri studtagoj :

Dum la unua tago ĉiu prezentis sin kaj siajn lingvojn hejme lernitajn aŭ enlerneje lernatajn; poste mi prezentis la lingvan situacion en tiu gimnazio, en la urbo Friburgo, en la kantono Friburgo, en Svislando, en Eŭropa Unio, en UN.

Sekvis mia kutima prezento de Esperanto kun historio, enkonduko pri -o kaj -a kaj konkurso (Iu kandidato devas unue en Esperanto konstrui a-vorton laŭ o-vorto kaj poste same en la franca... Ĉiuj tuj estas pli rapidaj en Esperanto ol en la franca). Poste ni iom vidis la lingvajn bazojn.

Dum la dua tago ni diligente studadis : klarigoj, legado, verkado.

Dum la tria tago mi havis helpanton : mia nepo Romain. Nia komenca temo estis renkontiĝoj : Romain parolis en Esperanto pri SFERO, REF, NR, ktp. Mi parolis pri UK, IJK, IS, KS, ktp. KS estas Komuna Seminario inter junuloj el Ĉinio, Japanio kaj Koreio. Ni povis montri fotojn. Romain havis memorbastoneton kun multaj retejoj ; la lernantoj povis vidi tion ĉe granda ekrano per projekciilo kaj havis komputilon por viziti la retejojn. Li ankaŭ metis eo-vikipedion en Eo ĉe la ekrano. Alia aktiveco estis, ke Romain kaj mi libere interparolis pri iu temo kaj la publiko devis diveni, pri kio temas. Paralele mi uzis mian

komputilon por skajpumi kaj ni povis paroli kun japano kaj du koreoj per komputiloj kaj kameraoj, do ni aŭdis kaj vidis ilin. Granda grava evento !

Mi aŭdis ĉe grupo knabinon, kiu diris : « *Mirinde ! Mi jam parolas Esperanton pli bone ol la germanan !* »

Mireille Grosjean

Genève

Esperanto-Grupo „La Stelo“

Case postale 734, 1212 Grand-Lancy 1

Tel. : 022 771 24 37

La kunvenoj okazas en Maison des Associations, rue des Savoises 15.

Espéranto-Genève-Régions en la Libro-Foire

Ree la asocio Esperanto-Genève-Régions ĉeestos la Libro-Foiron inter la 28a de aprilo kaj la 2a de majo per Esperanto-budo situanta precize je la sama kutima angulo. La organizantoj estos feliĉaj havi vizitantojn kaj, kial ne, helpantojn. Jen du retaj kontaktabloj :

mariezoesp@hotmail.com

aŭ charmian@aliceadsl.fr

Ni klopodas fari ekspozicion pri kelkaj famaj svisaj esperantistoj, nunaj kaj antaŭaj, kaj prezentos la lingvon per ludoj. Ĉi-jare ne okazos parolado.

Marie Zoller

Korekto : S-ino Charmian Common avertis pri nom-eraro komence de ŝia

artikolo titolita *En la Internacia Lernejo* aperinta en la bulteno 2009-3, p. 22. La instruistino invitinta la ĝenevajn esperantistojn nomiĝas ne Dova Dimbrovsi, sed Eva Dimcovski.

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

CP 246, 1000 Lausanne 22.

Tel : 021 647 29 28

076 411 14 55

esperanto@citycable.ch

CCP : 10-26785-8

www.esperanto.ch/Lausanne

Kunvenoj : Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon en la monato je la 20h00.

Komitato : Prezidanto : David Bühlmann
Tel. 021 624 36 38 ; Vicprezidanto :
Charlotte Blanc Maillard 079 393 32 63 ;
Sekretario : François Randin 076 411 14
55 ; Kasisto : Sonia Daubercies 079 649 88
86.

Venontaj kunvenoj

Aprile 5 : Projekciado de filmoj
NANDIR : *De Romo al Dubajo tra la kanalo de Suez. Kelkaj tagoj en Dubajo (Emirejoj arabaj). Kelkaj tagoj en Muskato (Sultanejo de Omano). Kelkaj tagoj en alia parto de la mondo (Franca Polinezio). La Karnavalo de Venecio.*

Maje 3 : Mireille Grosjean prelegos pri *Esperanto, frue aŭ malfrue vi lernos ĝin!* (Historia aspekto, konkurso, minikurso, movado, literaturo, kongresoj).

Junie 19 (sabate) : Migrado al Signal de Bougy kun la ĝenevanoj.

Septembre 6 : Programo decidota.

OktoBRE 4 : Programo decidota.

Novembre 1 : Programo decidota.

Decembre 12 : Zamenhofa Festo.

Propagando en la bazaro

Esperanto-propagando okazos en la laŭzana bazaro la sekvajn sabatojn inter la 9a kaj la 12a horoj : 10an de aprilo, 8an kaj 29an de majo, 5an kaj 12an de junio, 4an kaj 18an de septembro, 9an kaj 30an de oktobro.

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke.

Tel. 041 280 46 12.

Kunvenejoj

Gasthaus Adler, Gerliswilstrasse 78, 6020 Emmenbrücke. Tel. 041 281 18 38.

Gastejo Filali, Luzernerstrasse 6, 6020 Kriens. (Buso 1, direkto Kriens-Obernau, haltejo Linde/Pilatus) 041 320 60 86 aŭ 079 658 40 67. renata.filali@bluewin.ch

Ĉe gesinjoroj Anna & Koni Rey, Heimatweg 4, 6003 Luzern. 041 210 25 88.

Venontaj kunvenoj

Aprile 7 : Ĉe Filali 14h00-16h00 :
Konversacia rondo kun Sonja Brun.

Maje 5 : Ĉe Rey 14h00 : Paroliga leciono kun Paul Scherer, 14h30 : Humanismaj revoj de Zamenhof kun Paul Scherer.

Junie 2 : Ĉe Filali 14h00-16h00 :
Konversacia rondo kun Sonja Brun.

Julie 7 : Ĉe Rey 14h00 : Paroliga leciono kun Paul Scherer, 14h30 : Ludado kun Koni Rey.

Aŭguste 4 : Vaporŝipa ekskurso kun Koni Rey. 12h40 : Ekveturo.

Septembre 1 : Ĉe Filali 14h00-16h00 : Konversacia rondo kun Sonja Brun.

OktoBRE 6 : Ĉe Rey 14h00 : Paroliga leciono kun Paul Scherer,

14h30 : Vivo de Sophie Taeuber-Arp kun Sonja Brun.

Novembre 3 : Ĉe Filali 14h00-16h00 : Konversacia rondo kun Sonja Brun.

Decembre 1 : Ĉe Rey 14h00 : Zamenhofologio kaj programo 2011 kun Paul Scherer.

2011 Januare 5 : Ĉe Filali 14h00-16h00 : Konversacia rondo kun Sonja Brun.

Gastoj ĉiam bonvenas, sed pro eblaj subitaj ŝanĝoj konsilindas telefone aŭ rete certiĝi, ĉu la aranĝo disvolviĝos kiel anoncite.

Neuchâtel

Le jour étoilé – La stela tago

Kiuj aŭskultis la oratorion *Le jour étoilé* la 11an, 12an aŭ 13an de februaro jubileanta la centjariĝon de la Ruĝa Preĝejo de Neuchâtel, tiuj legis pri la esperantisteco de ĝia aŭtoro, la israela poetino Luiza Carol. Niaj *Kulturaj paĝoj* estas dediĉitaj al tiu muzika evento.

Kun la subtitoloj en esperanto
mendeblas DVD-disko de
Le jour étoilé - La stela tago
al : Association Oratorio
strato Mousson 5, 2074 Marin.
(Fr. 30 inklude la sendokostojn)

La Tour-de-Peilz

Svisa Muzeo de la Ludoj

Vizito en esperanto la 6an de junio

Vizito en esperanto de la Muzeo de la Ludoj okazos la dimanĉon 6an de junio. Al tiu renkonto jam anonciĝis deko da partoprenantoj. Ĝis 15 aliĝoj ili formos unu vizit-grupon, se estos pli ol 15 personoj, organiziĝos 2 vizit-grupoj.

Novaj partoprenemuloj sin anoncu al la muzea gvidanto Cesco Reale indikante siajn nomon kaj adreson, sian retadreson kaj telefonnumeron. Tiel, se necese, Cesco Reale povos ilin kontakti :

Kontaktabloj kun Cesco Reale:

Telefona: 041-76-234 18 43

rete: cescoreale@gmail.com

La programo estas anoncita sub :

http://www.doodle.com/chucrf2cvnz_aatbh

Vizitprogramo

Rendevuo je la 14h00 en la Muzeo. 14h15-15h00 : vizito. 15h00-16h00 : ludoj (interalie Cesco Reale ludigos iujn simplajn kaj interesajn ludojn tre taŭgajn por instrui esperantajn vortojn). La vizit-kosto ĉirkaŭos po 10 frankojn persone.

La Muzeo de la Ludoj atingeblas per 5-10 minuta promenado el la stacidomo de la urbeto La Tour-de-Peilz apud Vevey. En tiu mezepoka kastelo estas konservataj ĉarmegaj ekzempleroj de ludoj antikvaj kaj modernaj el diversaj landoj (Hindujo, Afriko, Ĉinujo, ktp).

Antaŭ aŭ post la vizito la partoprenantoj povos resti en la belega parko ĉirkaŭanta la kastelon, aŭ aldoni alian programeron al la Kastelo de Chillon aŭ *Alimentarium* de Nestlé en Vevey.

Lude kaj samideane Cesco Reale
<http://www.museedujeu.com/>

Wil

Esperanto-Klubo Wil (Orientvislando)
www.esperanto.ch/wil

Kunprezidantoj: Verena Chaves-Walder, Rosenhügelstr. 22, 9230 Flawil. Tel. : 071 393 41 49. chaves-walder@bluewin.ch kaj Wolfram Fischer Steigstrasse 12, 9116 Wolfertswil. Tel. : (P) 071 390 04 48 (O) 071 390 04 44. Fax : 071 390 04 47.

Kunvenoj : La esperantistoj kunvenas ĉiun unuan merkredon en la monato vespere de la 19-21 h. en la b'treff en Flawil situanta en la iama stacidomo.

Venontaj kunvenoj

Aprile 17 : Ĝenerala Kunveno de SES en la restoracio Freihof.

Maje 6 : Lumbildprelego de Myrta Fischer: Migre en la Filipinaj Montoj. Ekkunvene rakonta rondo.

Junie 2 : “Serĉo de la verda kato” : kultura evento en Sankt-Gallen. La renkontejoj estas la Stacioj de Flawil kaj St.-Gallen.

Aŭguste (sabate) 14 : Tuttaga Migrado.

Septembre 1 : Lumbildprelego de Barbara Pochanke : Esperanta vojaĝo al Mongolio. Ekkunvene rakonta rondo.

Oktobre 14-17 : Partopreno al la Svisa Feria Esperanta Renkontiĝo en Métabief (en Francio norde de Vallorbe).

Novembre 3 : Raporto de Verena kaj Gabriel Chaves pri la Universala Kongreso en Kubo. Ekkunvene : rakonta rondo.

Decembre 1 : Rakledvespero kun poemoj, rakontoj kaj kantoj.

Zürich

Esperanto-Societo Zürich

Archstrasse 2, 8610 Uster.

Poŝfako 858, 8034 Zürich.

Tel. 044 251 50 25 (dum officejaj horoj)

Poŝtkonto: 80-17287-1

<http://esperanto.ch/zuriko>.

**La kunvenoj okazas en
Centro “Karl des Grosse,
Kirchgasse 14, 8001 Zürich.
Renkontiĝoj regulaj**

ĉiam la lastan ĵaŭdon de la monato en la hejmo de Michael Roesser, Weinbergstr. 137, 8006 Zuriko je la 20h30 (rekte apud la haltejo "Rössli-strasse" de la tramoj 7 kaj 15 je 10 minutoj de la ĉefa stacidomo).

**Informoj pri la aktuala programo
de Esperanto-Societo Zuriko
troviĝas en la reto sub:**

www.esperanto.ch/zuriko/programo.ht

zuriko@esperanto.ch

<http://esperanto.ch/zuriko>

Ni funebras

Gerard Cool 1921-2009

Gerard Cool naskiĝis la 8an de novembro 1921 en Medan en Indonezio, tiam kolonio de Nederlando.

Mi konatiĝis kun li dum mia unujara studrestado en la privata lernejo *L'Ecole d'Humanité* de Paulus Geheeb en la vilaĝo Goldern, kie li entuziasmigis nin per sia vivanta arto instrui matematikon kaj sciencajn fakojn kaj ankaŭ per sia muzikista talento.

Li loĝis kaj lektiis en apudlerneja dometo nomata *Stöckli*, kie ni ŝatis plue restadi post liaj lecionoj, tiom variaj kaj instruaj estis tiuj konversaciaj momentoj kaj tiom variaj estis la dokumentoj ekspoziciitaj en lia apartamenteto. Li fakte havis la talenton vekti nian scivolemon pri plej diversaj temoj. Horojn ni babilis kun li pri biologio kaj evoluismo, muziko, beletro, lingvaj problemoj kaj esperanto, politiko kaj liaj rememoroj pri koloniisma ekspluatado, ktp. Kiel adoleskantoj ni sentis en Gerard Cool respektaman konsilanton kaj fidindan pensgvidanton. Certe inter liaj pozitivaj influoj mi ŝuldas al li miajn esperantistecon kaj respektemon al la naturo kaj al alies opinioj.

Estas fakte per niaj reciprokaj por-esperantaj okupoj, ke poste ni havis regulajn kontaktojn. Li estis edziĝinta al Florence Coté el Kanado. Ni renkontiĝis ĉe ilia bela ĉaledo en Wasserwendi super Goldern aŭ en

La Chaux-de-Fonds ĉe KCE, kie Gerard ŝatis debati kun matematikistoj kaj ĉe CDELI, kiun li riĉigis per siaj eldonaĵoj. Li estis mem UEA-fakdelegito pri matematiko kaj klasika muziko.

Liaj verkoj en Esperanto rilatas al tiuj du fakoj kaj ankaŭ al sciencfikcio kaj filozofio. Interesatoj povas ilin konsulti aŭ pruntepreni ĉe CDELI.

Lia edzino Florence deĵoris dum periodo kiel kasisto de SES kaj ĉefdelegito de UEA en Svislando. Ankaŭ ŝiaj Esperanto-funkcioj estis kaŭzo de renkontiĝo.

Kiam Gerard emeritiĝis el sia instruista funkcio, tiam kun Florence li decidis translokiĝi al klimato pli milda loko ebliganta reale ĝardenumi, kio malsukcesas en la montaro. Kaj tiun idealan lokon ili trovis en Leibnitz en Aŭstrio.

El tiu vilaĝo Gerard regule donace sendis al CDELI specimenojn de siaj novaj eldonaĵoj, atestante tiel pri sia plua verkemo, kaj tio ĝis kelkaj semajnoj antaŭ sia subita morto je la 25a de novembro 2009.

Vokante la aŭtoran nomon Gerard Cool ĉe la biblioteka retkatalogo www.RERO.ch oni akiras la liston de liaj verkoj konsulteblaj ĉe CDELI. Kaj Florence nun agas favore al la kompletigo de la verkokolekto de sia kara Gerard, kiun ŝi entombigis kun kelkaj amikoj la 30an de novembro per ceremonieto, dum kiu ŝi laŭtleĝis mesaĝon en esperanto de ilia amikino Loes

Demmendaal, kasistino de UEA, kaj de aliaj korespondantoj el Greklando, Nederlando, Svislando kaj Kanado. Tiu funebra kunveno malfermiĝis per la aŭskulto de konata kristnaska kanto, aranĝita de Gerard, kaj de aliaj liaj muzikaĵoj.

Claude Gacond

Berthe Spalinger-Favre **1921-2009**

Berthe Favre naskiĝis la 8an de majo 1921 en la domaro La Jonchère ĉe Val-de-Ruz. Sian estontan edzon Alfred Spalinger, kiu naskiĝis en Binningen la 29an de aprilo 1922, ŝi renkontis dum restado en Britio. Ambaŭ geedze instaligis en Reinach apud Basel. Sed Berthe penis integriĝi en la alemana lingvio, tial ŝi frekventis bazelan romandan klubon.

Ofte ŝi revenis al sia naskiĝa vilaĝo situanta inter la urboj Neuchâtel kaj La Chaux-de-Fonds por viziti konferencojn. Interalie ŝi regule ĉeestis prelegojn de la pastoro Charles Rittmeyer el Sainte-Croix, kiujn mi organizis en ambaŭ urboj. Ili estis dediĉitaj al la penso de Jesuo. Ŝi baldaŭ rimarkis, ke konklude al tiuj vesperaj kunvenoj kelkaj personoj venis al mi por provi konversacii esperantlingve kaj transdoni taskojn de koresponda kurso. Baldaŭ ankaŭ la taskojn de Berthe mi devis korekti kaj ŝin pli kaj pli ofte ni plezure renkontis inter la partoprenantoj de niaj aranĝoj semajnfinaĵoj kaj en la internacia skiferio, kiun ni organizis en Adelboden.

Baldaŭ en Bazelo ŝi sentis sin malpli soleca dank'al sia aliĝo al la loka

Esperanto-Grupo, kies pli kaj pli aktiva membro ŝi fariĝis. Ŝia hejmo en Reinach ofte gastigis vizitantojn el la tuta mondo. Plurfoje mi havis la privilegion esti unu el tiuj gastoj okaze de miaj aktivecoj en la bazela regiono. Ŝi entuziasme rakontis pri sia partopreno en Universalaj Kongresoj kaj aliaj esperanto-aranĝoj kaj ŝatis montri siajn manlaboraĵojn kaj raportojn pri la aktivecoj de la familianoj.

La morto ne longe disigis Berthe kaj Alfred Spalinger, kiuj forpasis preskaŭ samtempe en la lasta somero 2009, ŝi la 27an de junio kaj li la 8an de aŭgusto.

Claude Gacond

Madeleine Welsch **1925-2009**

Marie-Louise Münger konatiĝis hazarde kun Madeleine Welsch revene el inaŭgura renkonto ĉe CDELI. En la stacidomo de La Chaux-de-Fonds, kiam ŝi adiaŭis samideanojn, tiam iu venis al ŝi dirante: « *Ankaŭ mi parolas esperanton!* ». Kaj ambaŭ kune reveturis al Lausanne kaj inter ili tuj naskiĝis profunda amikeco. Madeleine baldaŭ fariĝis la baptopatrino de Michaela, la unua filino de Marie-Louise.

Madeleine Welsch, kiu naskiĝis la 19an de julio 1925, praktikis esperanton ĉefe kadre de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE), kies kongresojn ŝi frekventis. Kiam venis por ŝi la aĝo eniri maljunulejon, tiam ŝia kolekto de la revuo *Esperanto Katolika* kaj ŝiaj aliaj esperantaĵoj venis riĉigi la

esperanto-kolektojn de CDELI. Kaj estas en la hejmo Foyer Mont-Calme en Lausanne, ke ŝi ĵus mortis la 22an

de decembro, kiel sciigis al ni kun granda tristo Marie-Louise Münger.

Claude Gacond

Por paroli pri Afriko Johan Derks venos Svislanden invitita de Mireille Grosjean

Johan Derks estas esperanto-aktivulo en Nederlando. Kiam ĉi-vintre li partoprenis en Novjara Renkontiĝo en Germanio, tiam li jam renkontis svisojn. Li restadis kun sia edzino en Burundo por instrui Esperanton. Kaj tie li nun planas starigi kulturcentron laŭ originala koncepto. Li deziras prezenti tion al ni en Svislando.

Invitita de Mireille Grosjean li alvenos Svislanden por kelktaga restado marde la 25an de majo. Li povos partopreni en gruparanĝoj ekde tiam ĝis la vendredo vespere 28a. Sabate 29an li partoprenos la stud-sabaton ĉe CDELI en La Chaux-de-Fonds kaj prezentos sian planon inter la 15a kaj la 16a horoj.

Se vi deziras inviti lin al via grupo, bonvolu rilati pri tio kun Mireille Grosjean, kiu zorgos pri lia turneo Svislande.

Esperanto en Afriko

La kresko de la nombro de esperantistoj en kelkaj tre malriĉaj landoj montras, ke Esperanto ne estas nur luksaĵo praktikata de intelektuloj en riĉaj landoj, skribis Johan Derks, en raporto pri sia aktiveco, kiun li daŭrigas per tiuj vortoj :

Statistikoj mankas, sed se dedukti el la novaĵoj en *ESPERANTO EN AFRIKO*, la bulteno de la Afrika Komisiono de UEA, la kursoj multobligis dum la lastaj jaroj en Togo-lando, Benino, kaj Burundo, dum en aliaj landoj: Malagasujo, Angolo, Niĝerlando kaj Ebura Bordo (kelkaj ankaŭ diras Kotdivuaro) la organizaĵoj de esperantistoj estas bone establita kun kongresoj. Tie okazas kursoj kaj ekzamenoj.

En pasinta januaro Svetlana Milanović kaj mi donis kursojn por komencantoj kaj progresantoj en Burundo, ĉe la lago Tanganjiko, unu el la dek plej malriĉaj landoj de la mondo. Ni suferis malluksecon, mal-eston de taŭgaj nutraĵoj, noktan bradon kaj malpurecon, sed ni hontas diri tion, ĉar la periodo de suferado por ni estis nur unu monato.

Johan Derks tiel daŭrigas sian raporton pri tiu agado :

Pli bone ni plendu pro la daŭraj suferadoj de la afrikanoj, ol pro la propraj nekonvenaĵoj. Ĉar la entuziasmo por niaj kursoj estis ege granda, ni engaĝiĝis ne nur bone instrui ilin, sed ankaŭ trovi manierojn por helpi organizi ilian asocion. Pro malriĉeco, kotizado de membroj al kluboj nepraktikeblas.

Jam kurslibrojn la burundanoj ne povas aĉeti kaj se iu havas lerno-libreton, ĝi estas baldaŭ ĉifonita pro eluzado tra multaj fingroj, kaj pro manko de bona formetujo, ekzemple libroŝranketo.

Kion fari? Ni elpensis kaj decidis helpi starigi Esperanto-centron, kie la lokaj esperantistoj povos renkontiĝi, kie gardatos Esperanto-libroj kaj kie, por havi enspezojn, estos je dispono komputiloj kun retaliro por la paganta publiko. La konstruado de la centro devos esti financata pere de monvarbado inter pli riĉaj esperantistoj en la mondo.

En la pasinta jarduono ni kreis la fondaĵon *Esperanto en evoluo* kun propra retejo, kiu celas ne nur helpi financi la Esperanto-centron en

Burundo, sed ankaŭ "*ĉiujn profitodonajn projektojn en malriĉaj landoj, kiuj celas doni bezonatan financon bazon al la tiea Esperantomovado*", tiel tekstas la statuto.

Nia kampanjo komenciĝis dum la Universala Kongreso, kun ankoraŭ nekonata sukceso, sed certe la burundaj esperantistoj bezonas ankaŭ financon helpon de legantoj de *SES informas*.

Se vi volas scii pli, klaku al <http://esp-evoluo.tk>, kie vi konatiĝos kun la internacia estraro, la urbo Rumonge, kie la Esperanto-centro estas planita kaj kun niaj amikoj tie. Por donaci al la centro estas ĉe UEA konto kun kodo eeer-u.

Johan Derks

Korespondproponoj

El Kubo

Mi estas kubano, de januaro 2008 mi studas Esperanton, kaj mi certe deziras plibonigi mian lingvouzon, pro tio mi petas al vi helpi min por trovi aliajn samideanojn, kiuj deziras korespondi. Jen miaj personaj konitaĵoj: Nomo: Jorge Abreu Junco. Sekso: viro. Aĝo: 49 jarojn. Profesioj: Teknikisto en masonaĵoj, teknikisto en Biblioteko, licenciato en Historio. Temoj: Mi deziras babili pri ĝeneralaj temoj. Povas skribi al mi personoj de ambaŭ seksoj, kaj de kia ajn aĝo. Mi promesas respondi ĉiujn. Mia adreso: Jorge Abreu, S. Sánchez, 102, Cruces-57500, CFGOS, Cuba.

El Togo

S-ino Ezin Moyadé Déla, 01-BP 4559-01 Togo, Comé. Ŝi estas 35-jaraĝa fraŭlino kun ĉarma knabeto. (Interesato petu ŝian foton al Claude Gacond.)

El Ĉeĥio

Mi estas 68-jara emerito, diplomita inĝeniero kaj estinta fervojisto, kiu tre ŝatas interŝanĝi leterojn kun gesamideanoj el la tuta mondo. Mi havas nenian plumamikon en Svislando. Mi korespondas pri variaj kaj diversaj temoj, ankaŭ mia granda hobbio estas kolekti poŝtmarkojn kaj bildkartojn. Mia adreso: Pavel ŠTASTNÝ, U Děkanky 1648/12, CZ-140 00 Praha 4, Ĉeĥa respubliko.

Redaktas: Richard Schneller (rs), Höhenstrasse 1 b, CH-9300 Wittenbach, rischneller(ĉe)gmail.com. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Dank' al esperanto grava kultura evento en Neuchâtel



Luiza Carol kaj Steve Muriset

(Foto François Huguenin)

La 11an, 12an kaj 13an de februaro okazis en la « Ruĝa Preĝejo » de Neuchâtel la prezento (kreiĝo) de la oratorio *Le jour étoilé* (*La stelita tago*).

La komponisto estis Steve Muriset (La Chaux-de-Fonds) kaj la verkisto nia samideanino Luiza Carol el Israelo. Ambaŭ renkontiĝis dank' al esperanto. Efektive, kiam oni petis de Steve komponi ion por la centjariĝo de la preĝejo

(nun Basilique Notre-Dame de l'Assomption), Steve Muriset tuj havis la ideon de oratorio (sed laika oratorio). La muzikon li jam aŭdis en la kapo kaj en la koro, la korusojn li jam imagis dise en la preĝejo, la spektaklo jam iama-niere vivis. Mankis nur la libreto : kiu verkos ĝin ? Martine Schneller ? Ne, sed ŝi havis la ideon, ke eble Luiza povus fari tion. Ŝi ja estas verkistino kaj kiam ŝi unua-

foje venis al Neuchâtel (survoje al CDELI, en 1997), tre plaĉis al ŝi la « Ruĝa Preĝejo » kun ĝiaj multaj sespintaj steloj ĉe la sojlo kaj ĉe la plafono. Ĉar ŝi estas juda, tio ŝajnis al ŝi eminente simbola, ke tiujn stelojn oni povas vidi en katolika preĝejo.

Verki la tekston Luiza do akceptis kun entuziasmo kaj kun Steve ŝi povis labori tute harmonie. La rezulto estis tiu bela kaj pripensiga spektaklo. La teksto estas simpla sed kiel ofte kun simplaĵoj ĝi estas esenca kaj universala : demandoj pri la homa vivo, la homa sinteno, la homa universala memoro. Ĝi ne koncernas unu religion pli ol alian, unu rason pli ol alian; ĝi estas vera verko de esperantisto, kiu koncernas la homaron ĝenerale, kun ties klopodoj kompreni la kreaĵon kaj la kreitaĵon. Multaj demandoj, multaj malsukcesoj sed ankaŭ multaj esperoj. Kial la homo ? Kiel la homo ? Kien la homo ?



Luiza kaj Martine

(Foto Luiza Carol)

Luiza scenigis infanon kun la patrino. La patrino klopodas respondi la demandojn de la infano : demandoj naivaj, demandoj ĝenaj kaj demandoj, kiuj fine eltiras iun

veron kaj devigas ĝin laŭeble esprimiĝi. Tiun tekston povas alparoli ĉiujn homojn ĉar ĉiu homo portas en si – eĉ se kelkfoje profunde kaŝita sub la priokupoj de la ĉiutaga vivo kaj la devigo ludi rolon en la socio – esperon de kvieto, de paco, de feliĉo.

Steve kaj Luiza renkontiĝis sur spirita kampo for de ĉiuj religiaj dogmoj. Estas bele, ke tiu spektaklo povis okazi en preĝejo – eĉ se, kiel ni povas imagi, la organizado ne okazis sen malfacilaĵoj. Aktoroj estis du (la patrino kaj la infano), muzikistoj estis kvardek kaj korusoj estis ses (kun entute proksimume 200 kantistoj).

En la korusoj partoprenis kantistoj de diversaj religioj (katolikaj, protestantaj, ortodoksaj, muzulmanaj, judaj kaj budhistaj); la tenoro (Christian Reichen) estis la protestanta pastoro, kiu unuigis Lucienne Amort kaj Steve Muriset antaŭ kelkaj jaroj. La etoso estis vere ekumena kaj je ĉiuj prezentoj ĉeestis esperantistoj kaj ankaŭ simpatiantoj.

Tial ŝajnis inde al la bultena teamo aperigi ĉi-poste la tekston de Luiza (ŝi havis la afablecon mem traduki ĝin al esperanto kaj al la angla.)

Por pli da informoj oni povas konsulti ŝian retejon :

www.luch.co.il/luiza (kaj ankaŭ
www.lejouretoile.ch)

Martine Schneller

Oratorio pac-sopira

Post atenta antaŭlego de la paroloj kantotaj de la ses korusoj mi iris kun mia edzino al la inaŭgura prezento de la oratorio *La stelplena tago* kun scivolemo. Je nia eniro preĝejen unu horon antaŭ la spektakla komenco jam ĉiuj benkaj sidlokoj estis okupitaj. Ĝojige per fald-seĝoj ni tamen trovis favoran lokon proksime de la pianistino. Tuj sentiĝis la neordinareco de la baldaŭa okazaĵo, ĉar la korusanoj kaj muzikistoj instaligiĝis ne nur antaŭ ni sur kvar niveloj en la ĥorejon mem, sed ankaŭ plurloke sur la galerion, kiu ĉirkaŭas la navon. Kiam fine eksonis la muziko, tiam ni mire konstatis, ke la komponisto Steve Muriset, mem estranta la orkestrojn kaj korusojn, ne nur gestis antaŭ ni, sed ankaŭ malantaŭ ni per travidebla ekranon ĉe la orgena galerio. Per tiu teknika artifiko ĉiuj muzikistoj malgraŭ sia diseco formis eksterordinaran tuton.

La infano kaj patrino blanke vestitaj, kies parolojn ripetis la korusoj, talente aktoris. Iliaj simplaj vortoj tuj vekis en ni realan emocijon, kiu kulminis, kiam la infano informiĝis, ĉu ankaŭ li devos soldate mortigi homojn por ne morti, kiel devis fari liaj patro kaj frato. Dum responde silentadis la patrino, la publiko partoprenis la homan dramon en vigla korprenemo. La oratoria teksto de Luiza Carol, kiu tralege ŝajnis al ni iom biblie tradicieca, fakte trafe pri-skribis la tragikan homan kon-

duton malpacigan. Aŭdiĝis ne nur la ploroj de miloj da homoj ĉe la jeruzalema Muro de Lamentoj, sed ankaŭ vigla espero al paco tutmonda de suferanta judino. La muzikista talento de Steve Muriset alportis eksterordinaran dinamismon al tiu oratorio pac-sopira, malkovrigante samtempe al la publiko la originalan belecon de la neogotika preĝejo jubilee festata.

Pro ĉio tio ni duan fojon iris aŭskulti tiun oratorion, kaj ĝi nin ree profunde impresis per la kvalito de ĉiuj siaj eroj kaj per sia superkristana ekumenismo. La elparolo de la korusoj infanaj kaj plenkreskulaj ne nur klare eĥis al la dialogo de la infano kaj patrino, sed tiuj ĥoroj el katolikaj, protestantaj kaj laikaj devenoj reale konkretigis ĝeneralan kunlaboron. Kaj el la katedro la mesaĝo de la juda filozofo Immanuel Kant impresis la aŭskultantojn tra la buŝo de la pastoro Christian Reichen. La atentigo pri la reala signifo en la hebrea de la nomoj de Adamo kaj Evo alportis al ĉiuj novan komprenon pri la unua rakonto de la biblio.

Ni revenis el tiu dua aŭskulto de *La stelplena tago* kun la sento, ke ni estis travivintaj historian muzikan eventon. Kaj persone mi ĝojis, ke CDELI vizite venigis el Israelo la poetinon Luiza Carol en nian regionon, kaj ke Martine Schneller ŝin renkontigis kun Steve Muriset. Tiu komponisto loĝas ĉe la riverkanjono

Doubs tute proksime de La
Chaux-de-Fonds. Estas en tiu ori-
ginala pejzaĝo, ke ambaŭ artistoj

plurfoje renkontiĝis por doni vi-
von al neordinara oratorio.

Claude Gacond

LA STELOPLENA TAGO

Oratorio

Teksto originale franca kaj traduko : *Luiza Carol*

Muziko : *Steve Muriset*

Roluloj

LA PATRINO KAJ LA INFANO
(parolantaj roloj).

LA KORUSO DE PATRINOJ KAJ
LA KORUSO DE INFANOJ (ko-
ruso de virinoj kaj koruso de infanoj,
reprezentante plimultigon de la pa-
rolantaj roluloj).

LA BURĜONO (Koruseto de ado-
leskantoj).

LA VERDA FOLIO (Koruseto de
plenkreskuloj).

LA AŬTUNA FOLIO (Koruseto de
maljunuloj).

KORUSO DE FOLIOJ: (Ĝi kon-
sistas el la korusoj de La Burĝono,
La Verda Folio kaj la Aŭtuna Folio
kune).

IMMANUEL KANT, ISAIO (Teno-
ro, solisto).

KORUSO DE LA EKZILITOJ EL
LA ĜARDENO DE EDENO (Gran-
da miksitaj korusoj).

UNUA PARTO

1. Enkonduko

*La korusoj de Burĝono, Verda Folio
kaj Aŭtuna Folio estas ene de la
preĝejo kaj plu restos ĝis la fino. Je*

*la komenco de la unua parto, ankaŭ
la koruso de infanoj estas ene de la
preĝejo. La Patrino kaj La Infano
estas ekster la preĝejo. Oni vidos ilin
pere de video-ekrano.*

2. Korusoj

KORUSO DE INFANOJ : Saluton,
fragila burĝono, tremanta fragila
burĝono ! Diru al mi, amiko, kio vi
estis antaŭe ?

LA BURĜONO : Mi estis revo de
branĉeto, tremanta revo de branĉeto ;
kanto de pluvo, kareso de suno, jen
kio mi estis antaŭe.

KORUSO DE INFANOJ : Saluton,
verda folio, tremanta verda folio !
Diru al mi, amiko, kio vi estis an-
taŭe ?

LA VERDA FOLIO : Mi estis revo
de burĝono, tremanta revo de bur-
ĝono; danco de pluvo, rideto de
suno, jen kio mi estis antaŭe.

KORUSO DE INFANOJ : Saluton,
aŭtuna folio, tremanta aŭtuna folio !
Diru al mi, amiko, kio vi estos foje ?



Foto : François Huguenin

LA AŬTUNA FOLIO : Mi estos revo en vento, tremanta revo en vento; murmuro de pluvo, eĥo de suno, jen kio mi estos foje.

LA INFANO : Panjo, diru al mi, Panjo, kio mi estis antaŭe ? Kio mi estis ? Kio mi estis antaŭ ol mi fariĝis infano ?

LA PATRINO : Karulo, vi estis nia revo, la revo de Paĉjo kaj mi, la kanto de du koroj flugantaj en la ĉielo, jen kio vi estis antaŭe.

3. Recitado

LA INFANO : Panjo, diru al mi Panjo, kio mi estos ? Kiu mi estos ? Kia mi estos, post kiam mi ne plu estos infano ?

LA PATRINO : Vi rikoltos kolorojn, la melodiojn de la lumo; rikoltisto de sinsekvaj sezonoj, rikoltisto de doloroj kaj ĝojoj, jen kio vi estos.

LA INFANO : Panjo, diru al mi, Panjo, kiu faris la kolorojn de la sezonoj ? Kiu faris ĉiujn sonojn de la tero ? Panjo, diru al mi, Panjo ! Panjo, diru al mi ! Diru al mi, Panjo !

LA PATRINO : Rigardu bone tiun ĉi horloĝon. Ĝi montras la tempon, ĝi sonorigas la tempon, kaj ĝia sono disiĝas al kvar ventoj.

4. Intermezo

La sonoriloj sonoras. Dume, LA PATRINO kaj LA INFANO eniras la preĝejon, sekvataj de la korusoj de Patrinoj kaj de Infanoj.

5. Recitado

LA PATRINO : Nia mondo similas al tiu ĉi horloĝo, krom la fakto, ke ĝi estas tre granda. La granda horloĝisto kiu faris ĝin estas la Patro de tiu ĉi mondo. Li estas tre granda kaj tre potenca.

KORUSO DE FOLIOJ : La Patro de tiu ĉi mondo estas tre granda kaj tre potenca.

LA PATRINO : La Patro de ni ĉiuj estas tre granda. Li donas al ni la spacon kaj la tempon, kiuj estas la koloroj de la sezonoj, kaj la sonojn kiuj disiĝas al kvar ventoj, kaj ĉion, kion ni scias.

KORUSO DE FOLIOJ : La Patro de ni ĉiuj estas tre granda. Li donas al ni la spacon kaj la tempon, kiuj estas la koloroj de la sezonoj, kaj la sonojn kiuj disiĝas al kvar ventoj, kaj ĉion, kion ni scias.

LA PATRINO : Pro tio, ke ni pensas kaj kapablas fari demandojn, al Li ni devas danki.

LA INFANO : Pro tio, ke mi pensas kaj kapablas fari demandojn, al Li mi devas danki.

LA PATRINO : Venu ĉi tien, mia filo, venu tial, ke mi legu al vi el la Biblio vere mirindan rakonton : la rakonton pri la mondkreado.

KORUSO DE FOLIOJ : La rakonton pri la mondkreado.

LA PATRINO malfermas la Biblion.

6. Intermezo

DUA PARTO

7. Koruso

LA PATRINO : « En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron. »

KORUSO DE PATRINOJ : « En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron. »

Oni komprenigas la publikon, ke la tempo pasas kaj LA PATRINO daŭrigas sian legadon el la Genezo, sed

ĝiajn vortojn kovras la muziko. Poste, ĝiaj vortoj aŭdiĝas denove :

LA PATRINO : « Dio kreis la homon laŭ Sia bildo... »

KORUSO DE PATRINOJ : « Dio kreis la homon laŭ Sia bildo... »

LA PATRINO : « La Eternulo kreis la homon el polvo de la tero, kaj Li enblovis en lian nazon spiron de vivo, kaj la homo fariĝis viva animo. »

KORUSO DE PATRINOJ : « La Eternulo kreis la homon el polvo de la tero, kaj Li enblovis en lian nazon spiron de vivo, kaj la homo fariĝis viva animo. »

8. Recitado

LA INFANO : Kaj tiu homo, la homo kiun Dio faris el la polvo de la tero... kiel li nomiĝis, Panjo ?

LA PATRINO : La unua homo nomiĝis tute simple « homo ». Tio estas « adam » en la hebrea.

LA INFANO : Kial en la hebrea ?

LA PATRINO : Vidu, tiu ĉi libro el kiu mi nun legas al vi, estis skribita en la Mezoriento, en la antikva lingvo de la hebreoj. Kaj poste, oni tradukis ĝin en ĉiujn lingvojn de la tero. En la hebrea, kiam oni diras « tero », oni diras « adama ». Do, Dio kreis la homon el la « adama », tio estas el la tero.

LA INFANO : « adama ».

KORUSO DE INFANOJ : « adama », « adama »...

LA PATRINO : Vidu, la tero de la Mezoriento estas ofte tre ruĝa. La ruĝa argilo videblas ĉiuloke. Kaj en la hebrea, kiam oni diras « ruĝa », oni diras « adom ».

LA INFANO : « adom ».

KORUSO DE INFANOJ : « a-dom », « adom »...

LA PATRINO : Ruĝo estas koloro de amo. Ĝi estas la koloro de atesto : ĝi atestas pri tio, ke Dio faris nin el la tero, kun multa amo.

KORUSO DE FOLIOJ : Ruĝo estas koloro de amo, koloro de atesto.

LA INFANO : « adom ».

KORUSO DE INFANOJ : « a-dom », « adom »...

LA PATRINO : Kaj la sango fluanta tra niaj vejnoj, la ruĝa sango de la vivo, en la hebrea nomiĝas « dam ».

LA INFANO : « dam »

KORUSO DE INFANOJ : « dam », « dam »...

LA PATRINO : Nu, ĉu vi vidas, ĉiuj tiuj vortoj similas en la hebrea: « homo » estas « adam » ; « adam » similas al la tero, al ruĝo kaj al sango. La homo, la ruĝa tero kaj la sango...

KORUSO DE FOLIOJ : adam adama dam adom adam adama dam adom...

LA PATRINO : Tial, kiam Dio parolis al Adam, Li nomis lin tute simple « adam », tio estas « homo » ; kaj Adam komprenis, ke Dio alparolas lin, ĉar ne estis aliaj homoj sur la tero.

LA INFANO : Do, en la hebrea, ĉiuj homoj estas « adamoj » ?

LA PATRINO : Jes, en la hebrea, ĉiuj homoj nomiĝas « adamoj ». Bele, ĉu ne ? Tiel, oni povas rememori, ke ni ĉiuj estas la posteuloj de la unua homo, Adam. Ni ĉiuj estas fratoj.

LA INFANO : Jes, ĉar Adam estas nia praavo. Sed Adam ne enuis esti tute sola sur la tero ?

LA PATRINO : Dio prenis ripon el la korpo de Adam kaj faris virinon, por ke Adam ne estu sola. Adam nomis sian virinon Hava, ĉar en la hebrea tiu ĉi nomo signifas « la vivon ». Do vidu : Adam kaj Hava, la tero kaj la vivo, niaj du prageavoj.

LA INFANO : Kaj kie vivis Adam kaj Hava ?

LA PATRINO : Ili vivis feliĉe en la ĝardeno de Edeno, kiun Dio kreis por ili.

LA INFANO : Kaj kion manĝis Adam kaj Hava, en la ĝardeno de Edeno ?

LA PATRINO : Ili manĝis fruktojn kaj herbojn, samkiel ĉiuj aliaj estaĵoj loĝantaj en la ĝardeno de Edeno. Dio estis Tiu, kiu decidis, kion la homoj kaj la bestoj devas manĝi. Mi legos al vi Liajn parolojn el la libro :

Ŝi legas.

9. Koruso

KORUSO DE PATRINOJ : « Kaj Dio diris : Jen Mi donis al vi ĉiujn herbojn, kiuj semas semon, kiuj troviĝas sur la tuta tero, kaj ĉiujn arbojn, kiuj havas en si arban frukton, kiu semas semon; tio estu por vi manĝaĵo. »

KORUSO DE FOLIOJ : « ... tio estu por vi manĝaĵo. »

KORUSO DE PATRINOJ : « Kaj al ĉiuj bestoj de la tero kaj al ĉiuj birdoj de la ĉielo kaj al ĉiuj rampaĵoj sur la tero, kiuj havas en si vivan animon, la tutan verdan herbaĵon kiel manĝaĵon. Kaj fariĝis tiel. »

KORUSO DE FOLIOJ : « Kaj fariĝis tiel. »

LA INFANO : Do, en la ĝardeno de Edeno, la homoj ĉerpis fruktojn kaj herbojn por manĝi ?

LA PATRINO : Jes, tiel oni skribas.

LA INFANO : Do, en la ĝardeno de Edeno, la leonoj ne manĝis bovidojn ? La ursoj ne manĝis fiŝojn ? Ĉu ĉiuj estaĵoj manĝis nur plantojn ?

LA PATRINO : Jes, karulo. En la ĝardeno de Edeno, ne estis sufero. Ne estis perforto. Ĉiuj estaĵoj ĝojis, estis plaĉo por ĉiuj, troviĝis bona manĝaĵo por ĉiuj. En la ĝardeno de Edeno estis paco.

KORUSO DE FOLIOJ : En la ĝardeno de Edeno estis paco.

LA INFANO : Kial do oni ne restis en la ĝardeno de Edeno ? Kial ni troviĝas ĉi tie ?

LA PATRINO : Ĉar la homoj estis forpelitaj el la ĝardeno de Edeno.

LA INFANO : Forpelitaj ? Kial ili estis forpelitaj ?

LA PATRINO : Adam kaj Hava manĝis frukton, kiun Dio malpermesis al ili : la frukton, kiu kreskis el la arbo de la kono pri bono kaj malbono. Kaj ekde tiam, ĉiufoje kiam la homo ne obeas la leĝon de Dio, io malbona okazas al li.

10. Recitado kaj koruso

KORUSO DE FOLIOJ : Ĉiufoje kiam la homo ne obeas la leĝon de Dio, io malbona okazas al li. Ĉar Dio estas leĝo. Ĉar Dio estas leĝo.

LA PATRINO : Kaj ekde tiam, ni estas ekzilataj el la ĝardeno de Edeno. Kaj ekde tiam, la homoj devas morti. Ni estas faritaj el la tero kaj

devas reveni en la teron. Ĉar tiel Dio parolis al Adam.

Ŝi legas.

KORUSO DE PATRINOJ : « En la ŝvito de via vizaĝo vi manĝados panon, ĝis vi revenos en la teron, el kiu vi estas prenita ; ĉar vi estas polvo kaj refariĝos polvo. »

KORUSO DE FOLIOJ : « ... ĉar vi estas polvo kaj refariĝos polvo. »

LA INFANO : Ĉu tial mia patro revenis en la teron ? Ĉu tial ? Respondu, Panjo !

KORUSO DE INFANOJ : Respondu, Panjo ! Respondu, Panjo !

LA PATRINO : Jes, karulo. Tial.

TRIA PARTO

11. Recitado kaj koruso

LA INFANO : Panjo, diru al mi, Panjo, kien foriris mia pli aĝa frato ?

KORUSO DE INFANOJ : Kien li foriris ? Kien li foriris ?

LA PATRINO : Via frato foriris al la milito. Ĉar en la mondo ekzistas militoj, kaj via frato fariĝis soldato. Soldato.

LA INFANO : Panjo, kial vi ploras dum la tuta tago ? Kial vi ne volas ludi kun mi ?

KORUSO DE INFANOJ : Kial ? Kial ?

LA PATRINO : Mi ploras, ĉar mi pensas pri via frato. Mi ploras, ĉar mi estas patrino de soldato. Mi ploras, ĉar dum la milito via frato devas mortigi aŭ morti, kaj mi ne volas ke li mortigu, kaj mi ne volas ke li estu mortigita. Mi ploras, ĉar ĉiuj soldatoj




Foto Charles Feigel

en la mondo estas filoj de plorantaj patrinoj, kaj ĉiuj devas mortigi aŭ morti. Tamen, ni estas ĉiuj el la sama familio, la familio de Adam.

KORUSO DE LA EKZILITOJ EL LA ĜARDENO DE EDENO : Tamen, ni ĉiuj apartenas al la sama familio, la familio de Adam.

LA PATRINO : Kaj tial la milito estas la plej trista afero en la mondo, karulo. Kaj la patrinoj ploras, ploras, ploras...

KORUSO DE LA EKZILITOJ EL LA ĜARDENO DE EDENO :

Ĉar ni ĉiuj apartenas al la sama familio, la familio de Adam.

LA INFANO : Ĉu ankaŭ mi devas fariĝi soldato ? Do, ja tio mi devas fariĝi ? Ĉu tio estas mia estonteco ? Ĉu tial mi troviĝas sur la tero ? Por mortigi aŭ esti mortigita ? Diru al mi la veron, Panjo !

KORUSO DE INFANOJ : Respondu al mi, Panjo ! Respondu al mi, Panjo ! Panjo ! Panjo !

LA PATRINO deturnas sin de LA INFANO.

KORUSO DE PATRINOJ : Dio mia ! La demandoj de la infanoj ! Tiuj demandoj kiujn ni ne scipovas respondi ! Tiuj demandoj obstinaj, tiuj demandoj tiom gravaj, kiuj ricevas neniun respondon krom niaj larmoj, niaj larmoj, niaj larmoj...

LA INFANO : Diru al mi la veron, Panjo !

KORUSO DE INFANOJ : Respondu al mi, Panjo ! Respondu al mi, Panjo ! Panjo ! Panjo !

LA PATRINO : Mia filo, ni devas esperi... ĉar Dio donis al ni la esperon... Ni esperu, ke unu tagon estos pli da amo inter la homoj sur la tero... kaj militoj ne plu okazos... Ni esperu...

LA INFANO : Sed kial entute okazas milito, se Dio donis al ni la tutan teron, kaj ni ĉiuj apartenas al la sama familio, la familio de Adam ?

KORUSO DE INFANOJ : Kial, Panjo ? Kial ? Kial ? Kial ?

KORUSO DE PATRINOJ : Dio mia ! La demandoj de la infanoj ! Tiuj demandoj kiujn ni ne scipovas respondi ! Tiuj demandoj obstinaj, tiuj demandoj tiom gravaj, kiuj ricevas neniun respondon krom niaj larmoj, niaj larmoj, niaj larmoj...

KORUSO DE INFANOJ : Kial, Panjo ? Kial ? Kial ? Kial ?

KORUSO DE PATRINOJ : Dio mia ! Kiom da infanoj faras la saman demandon en la mondo ? Kiom da patrinoj havas neniun respondon krom larmoj, larmoj, larmoj...

KORUSO DE INFANOJ : Kial ? Kial ? Kial ?

KORUSO DE PATRINOJ : Dio mia ! La demandoj de la infanoj ! Tiuj demandoj kiujn ni ne scipovas respondi ! Tiuj demandoj obstinaj,

tiuj demandoj tiom gravaj, kiuj ricevas neniun respondon krom niaj larmoj, niaj larmoj, niaj larmoj...

KORUSO DE INFANOJ : Kial ? Kial ? Kial ?

KORUSO DE PATRINOJ : Niaj larmoj, niaj larmoj...

KORUSO DE INFANOJ : Kial ? Kial ? Kial ?

LA PATRINO : Mia filo, mi estas simpla virino. Mi ne scipovas respondi al ĉiuj viaj demandoj. Mi ne estas filozofa. Mia filo, mi tamen scias ke ni devas esperi... ĉar Dio donis al ni la esperon... Ni devas esperi, ke unu tagon estos pli da amo inter la homoj sur la tero... kaj militoj ne plu okazos... Ni devas esperi...

12. Recitado kaj koruso

LA PATRINO : Foje ekzistis tre fama germana filozofa, Immanuel Kant, kiu diris tiujn vortojn:

KANT : « Ĉiutage, du aferoj des pli plenigas mian spiriton per admirego kaj konsterno, ju pli mi pensas pri tio : la steloplena ĉielo super mi kaj la morala leĝo ene de mi. »

LA INFANO : Mi ne komprenas, Panjo. Kion tio signifas ?

LA PATRINO : Tio signifas, ke ni povas esperi. Se la moralo troviĝas en ni, konstruita ene de ni, samkiel la ĉielo estas konstruita super ni, tio signifas, ke ni povas esperi, ke venos la tempo, kiam la homoj amos unuj la aliajn kiel veraj fratoj kaj vivos en paco. Ĉar Dio estas ĉiam kun ni, Li ne forlasas nin.

LA INFANO : Tio estas kion la filozofa diris ?

LA PATRINO : Almenaŭ, tio estas kion mi komprenis...

LA INFANO : Diru al mi denove, kiel nomiĝis tiu germana filozofo.

LA PATRINO : Li nomiĝis Immanuel Kant. Lian antaŭnomon li mem elektis, kiam li lernis la hebrean, por legi la Bibliion. « Immanu El » en la antikva hebrea signifas « kun ni estas Dio ». Mi kredas, ke li elektis tiun ĉi nomon, por ke ĉiuj komprenu lian plej gravan mesaĝon, la resumon de ĉiuj imponaj libroj kiujn li verkis: « Kun ni estas Dio, Immanu El. » Eĉ la infanoj povas kompreni tiun ĉi mesaĝon de espero : « Kun ni estas Dio, Immanu El. »

LA INFANO : Jes, Panjo. Tion mi komprenas.

13. Koruso kaj recitado

**KORUSO DE LA EKZILITOJ
EL LA ĜARDENO DE EDENO :**
Immanu El, Immanu El...

KVARA PARTO

LA INFANO : Panjo, Panjo, kial vi silentas? Kial viaj okuloj ne plu vidas min? Panjo, kial vi sidas sur la genuoj? Kial vi mordas viajn manojn? Panjo, kio okazas, Panjo?

KORUSO DE INFANOJ : Kio okazas, Panjo? Panjo?

KORUSO DE PATRINOJ : Venu ĉi tien karulo, venu por ke mi brakumu vin. Mi devas diri al vi ion... ion... Mi amas vin, mia etulo, mia etulo. Mi amas vin, mi ne volas ke vi ploru, mi ne volas ke vi timu...

LA INFANO : Mi ne timas, Panjo. Mi sentas min bone en viaj brakoj. Kial mi timu?

KORUSO DE PATRINOJ : Mi devas diri al vi ion... Via pli aĝa frato troviĝas apud via patro nun.

Jes, ankaŭ li foriris el la vivo. Ni esperu, ke iliaj animoj troviĝas kune en la Ĉielo, inter steloj.

KORUSO DE FOLIOJ : En la Ĉielo, inter steloj.

LA INFANO : Mi komprenas, Panjo. Mi komprenas. Mia frato foriris en la Ĉielon, ĉu ne?

KORUSO DE PATRINOJ : Jes, karulo.

LA INFANO : Kaj la Ĉielo estas bela loko, tute simila al la ĝardeno de Edeno, ĉu ne?

KORUSO DE PATRINOJ : Jes karulo, vi bone komprenis.

LA INFANO : Do, en la Ĉielo estas paco, ĉu ne? Tie ekzistas nek sufero, nek perforto, la leonoj ne manĝas la bovidojn, la ursoj ne manĝas la fiŝojn, kaj ĉiuj ĝojas, ĉu ne?

KORUSO DE PATRINOJ : Jes karulo, en la Ĉielo, la Leono sidas apud la Bovido, La Granda Ursino kaj la Malgranda Ursino restas apud le Fiŝoj, kaj ĉiuj kunekzistas en la granda Paco de la Ĉielo.

LA INFANO : Sed... mi ŝatus, ke miaj patro kaj frato vizitu nin fojfoje. Mi bedaŭras ilian malĉeeston...

LA PATRINO : Fermu la okulojn, rigardu ene de via animo, kaj vi vidos tiujn, kiujn vi amas. Ili troviĝas en niaj koroj ĉiam, ĉar ni amas ilin.

KORUSO DE PATRINOJ : Nia amo prilumas niajn korojn, samkiel la steloj prilumas la ĉielon. Ni havas ĉielon en ni kaj ĉielon ekster ni.

LA PATRINO : Kiel ni povus esti solecaj?

**KORUSO DE LA EKZILITOJ
EL LA ĜARDENO DE EDENO :**
Immanu El, Immanu El...

14. Recitado kaj koruso

LA INFANO : Panjo, vi estas trankvila, sed viaj vangoj tre ruĝas. Kial vi estas tiom ruĝa nun ?

KORUSO DE PATRINOJ : Ruĝo estas koloro de amo. Ĝi estas la koloro kiu atestas pri tio, ke ni estas la infanoj de Dio. Ĉu vi rememoras pri tio ?

LA INFANO : Jes Panjo, mi rememoras.

KORUSO DE FOLIOJ : Ruĝo estas koloro de amo, la koloro de la atestado. adam adama dam adom adam adama dam adom...

LA INFANO : Panjo, pri kio vi pensas nun ? ŝajnas ke vi rigardas tiom malproksime, viaj pensoj ne plu estas kun mi.

KORUSO DE PATRINOJ : Mi pensas pri la Muro de Lamentoj. Temas pri la muro de la Granda Templo de Dio en Jerusalemo, la ege malnova hebrea templo, kiun oni detruis antaŭ longe. Tiu ĉi muro estas nun ruino...

KORUSO DE INFANOJ : Ĉu la muro estas ruĝa ?

KORUSO DE PATRINOJ : Ĝi estas ruĝa kelkfoje, je la sunleviĝo kaj sunsubiĝo.

KORUSO DE FOLIOJ : Ruĝo estas koloro de amo, la koloro de la atestado. adam adama dam adom...

15. Koruso

KORUSO DE PATRINOJ : El tiu ĉi malnova muro, nur fragmento restas. Miloj da homoj el la tuta mondo venas por preĝi apud tiu ĉi ruina muro. Ili preĝas en ĉiuj lingvoj de la mondo, por ke estu Paco en la mondo. Kaj ili esperas. La homoj parolas kun tiu muro, brakumas ĝin, verŝas

brulantajn larmojn sur ĝiajn grantajn ŝtonojn, konfesas al ĝi la plej profundajn sekretojn de siaj animoj, skribas siajn dezirojn sur paperetojn, kiujn ili enigas inter la ŝtonojn de la muro. Poste, ili atendas Dian signon kiel respondon. Fluas larmoj ĉe la piedon de la muro, fluas larmoj, malsekigante la malnovajn bazajn ŝtonojn. Vivantaj estas la ŝtonoj, kaj iliaj nevideblaj radikoj iras ĝis la brulanta koro de la tero.

KORUSO DE LA EKZILITOJ EL LA ĜARDENO DE EDENO :

Fluas larmoj ĉe la piedon de la muro, fluas larmoj, malsekigante la malnovajn bazajn ŝtonojn. Vivantaj estas la ŝtonoj, kaj iliaj nevideblaj radikoj iras ĝis la brulanta koro de la tero.

KORUSO DE PATRINOJ : La granito de la muro ŝajnas farita el malnovaj vortoj kaj larmoj, kiujn la tempo frostigis kaj aliformigis en ŝtonojn. La homoj venas kvazaŭ forpelitaj de kvar ventoj por preĝi kun siaj frontoj apud la ruina muro, kvazaŭ la muro estus trunko de maljuna arbo. Kaj iliaj larmoj fluas ĉe la piedon de la muro.

KORUSO DE LA EKZILITOJ EL LA ĜARDENO DE EDENO :

Fluas larmoj ĉe la piedon de la muro, fluas larmoj, malsekigante la malnovajn bazajn ŝtonojn. Vivantaj estas la ŝtonoj, kaj iliaj nevideblaj radikoj iras ĝis la brulanta koro de la tero.

KORUSO DE PATRINOJ : Mi sentas, ke la muro renaskiĝas. La suko de larmoj kaj fajro leviĝas en ĝiaj arterioj, kiuj aĝas jarmilojn. Brulantaj ĵuroj burĝonas, vortoj skribitaj, flustritaj, kantitaj, pensitaj, sonĝitaj... vortoj kreskas el la muro, kvazaŭ la muro estus la trunko de maljuna arbo. La vortoj kune formas

foliaron de lumaj folioj... La preĝoj kaj la deziroj murmuris sur la urbo.

ĈIUJ KORUSOJ : Paix, Paix, Paix... Paco, Paco, Paco... Peace, Peace, Peace... Paz, Paz, Paz... Friede, Friede, Friede... Pace, Pace, Pace... Shalom, Shalom, Shalom... Salam, Salam, Salam... Mir, Mir, Mir... Pau, Pau, Pau... Irini, Irini, Irini... Shanti, Shanti, Shanti... Béke, Béke, Béke... Heiwa, Heiwa, Heiwa... Smirom, Smirom, Smirom... Barish, Barish, Barish... Héping, Héping, Héping...

Sonoriloj.

EPILOGO

16. Recitado

LA INFANO : Panjo, kia estos tiu tago, kiam Paco regnos sur la tero, kiam nek malamo nek perforto plu ekzistos ?

LA PATRINO : Venu ĉi tien mia filo, venu, por ke mi legu al vi, el la Biblio, rakonton tute konsternigan : rakonton pri la savo de la mondo. Aŭskultu la profeton Jesaja.

17. Ario

JESAJA : « Kaj loĝos lupo kun ŝafido, kaj leopardo kuŝos kun kaprido; kaj bovido kaj leonido kaj grasigita bruto estos kune, kaj malgranda knabo ilin kondukos. Kaj bovino paŝtiĝos kun urso, kaj iliaj idoj kuŝos kune; kaj leono simile al bovo manĝos pajlon. Kaj suĉinfano ludos super la truon de aspido, kaj demamigita infano metos sian manon sur la neston de vipuro. Oni ne malbonagos kaj nenion difektos sur Mia tuta sankta monto, ĉar la tero estos tiel

plena de konado de la Eternulo, kiel la akvo plenigas la maron. »

KORUSOJ : « ... la tero estos tiel plena de konado de la Eternulo, kiel la akvo plenigas la maron. »

18. Koruso kaj recitado

LA PATRINO : Tiun ĉi tagon steloplennan, ni trovos amon kaj pacon en niaj animoj. Tiun ĉi tagon steloplennan, PACO venos sur la teron. Tiun ĉi tagon steloplennan, niaj suferoj fariĝos steloj sub niaj piedoj, kaj niaj amoj fariĝos steloj super niaj kapoj. Tiun ĉi tagon steloplennan, PACO venos rajdante nubon ; la nuboj similos blankan azenon. PACO trapaŝos la Pardon de via koro ; via koro similos oran fortikaĵon. PACO similos vin. Tiun ĉi tagon steloplennan, PACO venos rajdante kanton, ĝi proksimiĝos al la sanktejo de via koro kaj ĝi similos vin. Tiun ĉi tagon steloplennan, PACO venos rajdante revon, ĝi revivigos mortintojn en via koro kaj ĝi similos vin. Tiun ĉi tagon steloplennan, PACO venos rajdante lumradion, ĝi parolos ĉiujn lingvojn de Amo kaj ĝi similos vin.

LA FINO

Kun la subtitoloj en esperanto
mendeblas DVD-disko de
Le jour étoilé - La stela tago
al : Association Oratorio
strato Mousson 5, 2074 Marin.
(Fr. 30 inklude la sendokostojn)



Svisa kalendaro

Aprile

- 5 : Lausanne : LES-Kunveno.
- 7 : Luzern : LES-Kunveno.
- 17 : Wil : Ĝenerala Asembleo de SES.
- 22 : Basel : ESB-Kunveno.
- 24 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.
- 28 : Genève : Esperanto-budo ĉe Libro-Foiro ĝis la 2-a de majo.

Maje

- 3 : Lausanne : LES-Kunveno.
- 5 : Luzern : LES-Kunveno.
- 6 : Wil : EKW-Kunveno.
- 27 : Basel : ESB-Kunveno.
- 29 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.

Junie

- 2 : Luzern : LES-Kunveno.
- 2 : Sankt-Gallen : EKW-Kunveno.
- 6 : La Tour-de-Peilz : Vizito en esperanto de la Svisa Muzeo de la Ludoj.
- 19 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.
- 19 : Lausanne : LES-Ekskurso al Signal de Bougy.
- 24 : Basel : ESB-Kunveno Grün'80.

Julie

- 1 : Redakta datlimo de *SES informas*.
- 7 : Luzern : LES-Kunveno.
- 14 : Basel : ESB-Ekskurso : franca nacia festo.

Aŭguste

- 4 : Luzern : LES-Vaporŝipa ekskurso.
- 14 : Wil : EKW-Tuttaga ekskurso.
- 26 : Basel : ESB-Kunveno
- 29 : Basel : ESB-Ekskurso.

Septembre

- 1 : Luzern : LES-Kunveno.
- 1 : Wil : EKW-Kunveno.
- 4 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Kultura seminario.
- 6 : Lausanne : LES-Kunveno.
- 25 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.

Oktobre

- 2 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Kultura seminario.
- 4 : Lausanne : LES-Kunveno.
- 6 : Luzern : LES-Kunveno.
- 10 : Redakta datlimo de *SES informas*.
- 14-17 : Svisa Feria Esperanta Renkontiĝo en Métabief proksime de Vallorbe.
- 23 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.
- 28 : Basel : ESB-Kunveno.

Novembre

- 1 : Lausanne : LES-Kunveno.
- 3 : Luzern : LES-Kunveno.
- 3 : Wil : EKW-Kunveno.
- 6 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Kultura seminario.
- 20 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.
- 25 : Basel : ESB-Kunveno.

Decembre

- 1 : Luzern : LES-Kunveno.
- 1 : Wil : EKW-Rakledvespero.
- 4 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Kultura seminario.
- 12 : Lausanne : LES-Zamenhofa Festo.
- 18 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.

2011 Januare

- 5 : Luzern : LES-Kunveno.
- 10 : Redakta datlimo de *SES informas*.
- 10 : Lausanne : LES-Kunveno.

Aldonaĵoj kunsenditaj (2):

Samedis de pratique de l'espéranto organisés par le CDELI à La Chaux-de-Fonds

pour les étudiants du cours par correspondance,
les participants de cours du soir,
les élèves de cours scolaires,
les autodidactes

Quand on étudie l'espéranto en solitaire ou en prenant part à des cours, on ressent nécessairement le besoin de pouvoir pratiquer la langue sous la direction de pédagogues attentifs. Pour satisfaire ce besoin, le Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale (CDELI), de la Bibliothèque de la Ville de La Chaux-de-Fonds, organise régulièrement des samedis de pratique de l'espéranto qui sont largement ouverts à tous. Ils sont animés par Claude Gacond, l'archiviste du CDELI, Monika Molnar, Nancy Fontannaz et Luc Allemand.

Dates des prochains samedis

3 groupes d'étude :

débutants, moyens, avancés.

2010 : 24 avril, 29 mai, 19 juin,
25 septembre, 23 octobre, 20 novembre,
18 décembre.

Contribution

Lors de chaque samedi, il est demandé une contribution de Fr. 15.- (Gratuit pour les étudiants).

Inscription

Pour faciliter l'organisation des rencontres, les personnes qui y viendront sont priées de s'annoncer jusqu'au jeudi précédent auprès de Nancy Fontannaz, en indiquant leurs nom, adresse et numéro de téléphone.

Mail: nancy.fontannaz@gmail.com

Téléphone: 021 728 31 27 (avec répondeur).

Supplément de Fr. 5.- pour ceux qui viennent sans s'être inscrit ou se sont inscrits après le jeudi précédent.

Horaire des samedis

10.00 : Ouverture de la salle du CDELI :

On peut acheter des livres neufs : manuels, dictionnaires, etc, et à très bas prix des ouvrages de brocante. Possibilité de discuter avec les enseignants du cours par correspondance.

10.20 : Ouverture officielle et formation des groupes d'étude.

10.30 : 1^{ère} période d'étude. En général le travail se déroule dans la salle du CDELI et dans des salles attenantes que l'école met à notre disposition.

11.30: Pause café.

11.45 : 2^{ème} période d'étude.

12.45 : Pause du repas de midi en commun dans un restaurant voisin. Chacun paie son repas sur place.

14.15 : 3^{ème} période d'étude.

15.15 : Pause thé.

15.30 : 4^{ème} période d'étude.

16.30 : Conclusion de la rencontre à la salle du CDELI, où il est possible de rester pour converser en prenant le thé, et pour acheter des livres, ceci jusqu'à sa propre heure de départ.

17.30 : Clôture officielle.

Entrée du CDELI

Porte centrale nord du bâtiment de la Bibliothèque (Progrès 33). Si la porte est fermée, sonnez (bouton du CDELI) et quelqu'un viendra ouvrir. Montez au 2^e étage.

Pour atteindre la Bibliothèque

La Bibliothèque se trouve au numéro 33 de la rue du Progrès. De la gare, elle peut être atteinte par bus, N° 4 direction Hôpital. On peut acheter son billet dans le bus même. Demander l'arrêt "Bibliothèque".

Les automobilistes verront des écriteaux annonçant la bibliothèque. Parquer dans les rues du quartier, et non dans la cour.

**Au plaisir de vous rencontrer et de vous aider dans la pratique de l'espéranto.
Claude Gacond, Monika Molnar, Nancy Fontannaz et Luc Allemand.**

Esperanto-Praxis an Samstagen

organisiert vom CDELI in La Chaux-de-Fonds
für Fernkurs-, Abendkurs- und Schulkursteilnehmer
sowie Selbstlernende

Wenn man Esperanto selbst lernt oder an Kursen teilnimmt, hat man notwendigerweise das Bedürfnis, die Sprache praktisch und unter Anleitung aufmerksamer Lehrer anzuwenden. Um diesem Bedürfnis entgegenzukommen, organisiert das Dokumentations- und Studienzentrum für die internationale Sprache (CDELI) der Stadtbibliothek La Chaux-de-Fonds regelmässig an Samstagen Praxiskurse, die jedermann zugänglich sind. Sie werden von Claude Gacond geleitet, dem Archivar des CDELI, unter Mitarbeit von Monika Molnar, Nancy Fontannaz und Luc Allemand.

Nächste Kursdaten

3 Studiengruppen:

Anfänger, Mittlere, Fortgeschrittene.

2010 : 24. April, 29. Mai, 19. Juni,
25. September, 23. Oktober, 20. November,
18. Dezember.

Kosten

Pro Samstag wird ein Beitrag von Fr. 15.–
erhoben (für Studenten kostenlos).

Anmeldung

Um die Organisation zu erleichtern, werden die Teilnehmer gebeten, bis Donnerstag vor dem Kurs sich mit Name, Adresse und Telefonnummer bei Nancy Fontannaz anzumelden:

Tel. 021 728 31 27 (Telefonbeantworter) oder
E-Mail: nancy.fontannaz@gmail.com

Fr. 5.– Zuschlag für jene Teilnehmer, die sich nicht bis Donnerstag angemeldet haben oder ohne Anmeldung kommen.

Kursprogramm an Samstagen

10.00 : Öffnung des CDELI-Saals

Es besteht die Möglichkeit, neue Bücher zu kaufen: Lehrbücher, Wörterbücher usw. oder billige gebrauchte Werke. Es besteht auch die Gelegenheit, mit den Lehrpersonen des Fernkurses ins Gespräch zu kommen.

10.20 : Offizielle Eröffnung und Studiengruppenbildung.

10.30 : 1. Studienperiode. Im Allgemeinen wird im CDELI-Saal oder in benachbarten Klassenzimmern, die von der Schule zur Verfügung gestellt werden, gearbeitet.

11.30 : Kaffeepause.

11.45 : 2. Studienperiode

12.45 : Pause und gemeinsames Mittagessen in einem nahegelegenen Restaurant. Jede(r) Teilnehmer(in) begleicht selbst die Kosten an Ort.

14.15 : 3. Studienperiode.

15.15 : Teepause.

15.30 : 4. Studienperiode.

16.30 : Abschluss des Studiensamstags im CDELI-Saal, wo man verweilen kann, um Gespräche zu führen, Tee zu trinken oder Bücher zu kaufen, und zwar bis zur individuellen Abreisezeit.

17.30 : Offizieller Türschluss.

Eingang zum CDELI

Mitteltüre auf der Nordseite des Bibliotheksgebäudes (Progrès 33). Sollte die Türe geschlossen sein, bitte läuten (Knopf CDELI), es kommt jemand, um Ihnen zu öffnen. Begeben Sie sich in den 2. Stock.

Wie erreiche ich die Bibliothek?

Die Bibliothek befindet sich in der Rue du Progrès 33. Vom Bahnhof aus kann sie mit dem Bus Nr. 4 in Richtung Hôpital erreicht werden. Billette im Bus lösen. Sich nach der Haltestelle Bibliothèque erkundigen.

Die Automobilisten können den Schildern Bibliothèque folgen. Parkplätze in den Quartierstrassen, nicht im Hof der Bibliothek.

**Wir freuen uns, Sie kennenzulernen
und Sie bei der praktischen Anwendung des Esperanto unterstützen zu dürfen.
Claude Gacond, Monika Molnar, Nancy Fontannaz und Luc Allemand.**